

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



5

M A J O 1960 * J A R O XXIX

monata revuo, organiza, kultura, socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondukov 57, tel. 7-46-01.

Ĉefredaktoro: **Violin Oljanov**

Redakta komitato: **Ivan Sarafov, Stefka Ĥristova, Stefan Kiraĝiev, Stefan Maserov, Simeon Simeonov**

Abonpago: jara — 14 levoj, duonjara — 7, unuopa n-ro — 1,40; por eksterlando — 16 levoj, 1,5 dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Reklamoj. Ekstera kovrilpaĝo: tuta — 1000 levoj, duono — 500, kvarono — 280. Interna: tuta — 900, duono — 450, kvarono — 250. Korrespondanconoj — 1 levo por vorto; eksterlandaj adresoj — senpage.

PERANTOJ DE «BULGARA ESPERANTISTO»

Albanio: Inĝ. Cefo Fico 44 Rruga Stafa, Tiranë.

Koreo: Korea Esperanto-Asocio Pjeng' jang, P. O. kesto 16.

Sovetunio: J. Kudrjavickij, PK 1255 Moskva K-9

La Redakcio akceptas perantojn por la ceteraj landoj.

N. Nikolov. Antaŭ la kongreso en Târnovo	1
La rezulto de nia organiza konkurso 1959	2
Kongresaj novaĵoj	4
Supera distingigo de esperantistoj	5
R. Ĉerneva. Verda stelo en Rila montaro	5
Unesko oficialigis la celebradon de Zamenhof	6
Membroj subtenantoj	7
At. Gaev. Por la Esperanto-domo	7
N. Nikolov. Magnetofona servo de BEA	7
Esperantistoj pereintaj por la libero — Nikola Petrov Beĉev	8
45-a universala kongreso en Bruselo	9
Somera pedagogia semajno	9
L. Stefanova. Rikolto (versaĵo)	11
Ĉudomir. Ĉitrone (rakonto)	11
Blank-Danubo (kanto)	14
P. Kamburov. Lumportanto	15
M. Danev. Ni lingardistoj	15
Ada. Pri la vortfarado en Esperanto	16

Sur la kovrilo: **Nia ĉefurbo plibeliĝas**

LA REDAKCIO akceptas materialojn por la koncerna numero de «Bulgara esperantisto» ĝis la 12-a de la antaŭa monato. Nur kiel escepto gravaj aktualaj materialoj estos akceptataj ĝis la 25-a de la antaŭa monato. La aŭtoroj estas petataj skribi tre klare, kun granda interlinia spaco kaj marĝeno. Manuskriptoj ne estas resendataj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

ANTAŬ LA KONGRESO EN TARNOVO

De 9-a ĝis 11-a de julio k. j. en urbo Târnovo okazos la 34-a kongreso de bulgaraj esperantistoj. La kongreso estas supera organo de nia asocio. Ĝi diskutas kaj pritaksas la agadon de CK de BEA kaj de la kontrolo komitato, markas la estontan agadon kaj elektas novajn gvidantajn kaj kontrolantajn organojn.

La frua anonco de la okazonta kongreso permesas al la societoj disvolvi aktivan antaŭkongresan agadon. La societoj: «M. Gorkij» en Sofio, «Radio» en Pazarĝik, «Progreso» en Kubrat, «Flamo» en Dimitrovgrad, «Nova mondo» en v. Borima, «Progreso» en Polski Trâmbeș k. a. montras imitindan aktivecon. S-to «M. Gorkij» aplikas novan sistemon por kolektado de membrokotizo, abonoj por gazetoj kaj por disvendo de la glumarko por konstruo de Esperanta domo. S-to «Flamo» aranĝis en la kemia uzino «Stalin» konstantan propagandan vitrinon, similan bone aranĝitan vitrinon posedas nur kelkaj niaj societoj en la tuta lando. S-to «Nova mondo» kun la sindona helpo de la vilaĝanaro preparas parkon «Esperanto» en kiu oni konstruos ripozdomon por enlandaj kaj eksterlandaj gesperantistoj.

Tamen estas ankaŭ societoj kies agado stagnas, aŭ apenaŭ vegetas. Nun en la tagoj antaŭ la kongreso la societoj en Svištov, Dimitrovo, Miĉurin, Belogradĉik k. a. devas eliri el la letargio kaj ekmarŝi sur la vojo al novaj venkoj de nia movado. Ili havas fortojn kaj eblecojn tion fari kaj ni esperas ke ankaŭ la tiea esperantistaro renkontos nian kongreson per konsiderindaj sukcesoj.

En kunsido la estraroj de la lokaj societoj devas pridiskuti la ĝisnunajn societajn agadojn kaj tuj ili devas ellabori konkretajn planojn por pliaktivigo. En ĉiuj societoj estas neutiligitaj latentaj fortoj, kiujn ni devas okupigi per konkreta laboro.

La plej gravaj kaj urĝaj taskoj starantaj antaŭ ĉiuj niaj societoj kaj membroj estas jenaj:

1. Fondi novajn esperantajn societojn tie, kie estas ebleco pri tio.
2. Varbi novajn anojn al la societoj, kolektadi membro- kaj abonkotiĝojn.
3. Organizati parolantajn rondojn por ke la anoj povu pli lerte kaj sperte uzadi la lingvon en la kongresaj tagoj.
4. Plivigligi la propagandon de nia movado aranĝante prelegojn, ekspoziciojn, vitrinojn, montrokestojn, radiodisaŭdigojn k. s.

5. Grava momento en nia agado estas la elekto de societaj delegitoj por la kongreso. La societoj devas esti reprezentitaj en la kongreso de siaj plej agemaj, aŭtoritataj, spertaj kaj sindonaj membroj, ĉar ili devas vigle partopreni la kongresajn laborkunsidojn, kie estos pridiskutata nia ĝisnuna laboro kaj decidata la estonta agado de nia movado.

Antaŭ la kongreso la lokaj societoj devas plifirmigi la kontaktojn, kiujn ili havas kun la neesperantistaj organizaĵoj. Se ni sukcesos konvinki ilin helpi kaj apogi pli grandskale morale kaj materiale nian agadon, nia movado povus akiri novajn sukcesojn kaj poziciojn kiujn memstare ni ne povus efektivigi.

La kampanjo pri nomigo de placoj, bulvaroj, stratoj, lernejoj, hospitaloj, librovendejoj, transportaj haltejoj, dolĉaĵejoj k. s. objektoj je honoro de Esperanto kaj ĝia kreinto devas esti daŭrigata ankoraŭ pli insiste en la antaŭkongresaj tagoj. Oni devas argumentite per petskribo klopodi tiurilate antaŭ la koncernaj instancoj. En 1960 j. ne devas esti eĉ unu loĝloko en kiu ne estas Esperanta nomo.

Gesamideanoj, al aktiva kaj senlaca laboro por nia nobla celo kaj ideo!

Ni renkontu nian kongreson per grandaj sukcesoj en nia por- kaj per-esperanta laboro!

LA REZULTO DE NIA ORGANIZA KONKURSO 1959

CK de BEA aranĝis konkurson inter la societoj por plimultigo de la membraro kaj de la abonantoj al «Bulgara esperantisto».

La kondiĉoj de la konkurso estis jenaj:

1. Kiel bazon por plimultigo de la membraro ni akceptas la kontrolajn ciferojn, publikigitajn en N-ro 5 de BE.

2. Kiel bazon por plimultigo de la abonantoj ni akceptas la 70-procentan parton de la kontrola cifero por membroj. Ekz., se la kontrola cifero por membroj estas 120, la kontrola cifero por abonantoj esas 84 (70%).

3. La kalkulo de la rezultoj estas bazita sur procenta plenumo de la kontrolaj ciferoj. Estas konsiderata la meza procento por membroj kaj por abonantoj.

En la konkurso partoprenis 85 societoj, ekzistantaj antaŭ la 1-a de januaro 1959 jaro. En la konkurso iuj

societoj montris brilajn sukcesojn. Bedaŭrinde konsiderinda nombro da societoj ne streĉis siajn fortojn kaj anstataŭ plimultigon de sia membraro kaj abonantoj al la asocia organo montris malpliigon.

La unuan premion — flagon de CK de BEA kaj bibliotekon por 300 levoj gajnas la societo «Juna esperantisto» en vil. Pordim, distrikto de Pleven. Ĝi plenumis la kvoton por la membroj 193%, por abonoj al «Bulgara esperantisto» — 460. Suma plenumo de la plano 322%.

La duan premion — bibliotekon por 250 levoj ricevas societo «Roza valo» en urbo Kazanlâk. Ĝi plenumis la kvoton por la membroj 304%, por abonoj al «Bulgara esperantisto» — 50%. Suma plenumo de la plano 177%. Aldone ni notu ke la societo fondis en sia regiono 6 novajn Esperanto-societojn kun sume 51 membroj.

La trian premion — bibliotekon por 200 levoj, gajnis societo «Progreso» en Polski Trâmbeș, distrikto de Târnovo. Ĝi plenumis la kvoton por membroj 110%, por abonoj al «Bul-

gara esperantisto» 246. Suma plenumo de la plano 178%.

Sube ni prezentas tabelon de la rezultoj de nia organiza konkurso.

L I S T O DE LA SOCIETOJ DE BEA, PARTOPRENINTAJ LA ORGANIZAN KONKURSON

Sidloko de la societo	Membroj			Abonantoj			sume %
	plano	plenumo	%	plano	plenumo	%	
1. Asenovgrad	72	76	105	50	10	20	62.50
2. Begleĵ, plevana distr.	12	—	—	8	3	38	19
3. Belogradĉik	8	—	—	5	—	—	—
4. Belozem, Plovdiva distr.	8	—	—	5	1	20	10
5. Berkovica	35	—	—	24	1	5	2.50
6. Bjala	25	10	40	17	8	47	43.50
7. Blagoevgrad	30	40	133	21	3	14	73.50
8. Bogdan, Plovdiva distr.	12	—	—	8	—	—	—
9. Borima, Loveĉa distr.	70	76	109	46	5	11	60
10. Borovo, Rusena distr.	30	2	7	20	2	10	8.50
11. Botevgrad	12	16	133	8	5	63	98
12. Bracigovo, Pazarĝika distr.	10	2	20	17	1	14	17
13. Buhovo, Sofia distr.	14	—	—	9	—	—	—
14. Burgas	100	48	48	66	24	39	43.50
15. Ĉirpan	20	13	65	12	1	8	36.50
16. Dimitrovgrad	90	112	124	60	26	43	83.50
17. Dimitrovo	25	23	92	16	13	80	86
18. Dve mogili, Rusena distr.	12	—	—	8	—	—	—
19. Gabrovo	60	110	167	40	20	50	108
20. Goce Delĉev	50	29	58	34	4	12	35
21. Gorna Orjahovica — „Espero“	20	—	—	—	—	—	—
22. Gorna Orjahovica — garata	12	—	—	—	—	—	—
23. Gorni Domljan, Plovdiva distr.	12	6	50	8	—	—	25
24. Govedarci	18	10	55	12	4	33	44
25. Haskovo	25	30	120	16	24	150	135
26. Isperih	22	12	55	14	5	36	45
27. Jambol	45	50	111	33	12	36	74
28. Kamenovo, Slivena distr.	12	—	—	8	1	6	12
29. Kârĝali	30	17	57	20	8	40	48
30. Kazanlâk	50	152	304	34	17	50	177
31. Kjustendil	40	29	73	34	17	50	61.50
32. Klisura	15	—	—	10	—	—	—
33. Kneĵa	18	—	—	12	1	9	4.50
34. Kolarovgrad	120	51	42	80	22	27	350
35. Kriĉim	8	—	—	5	—	—	—
36. Kubrat	60	35	58	40	1	2	30
37. Leĥĉevo	28	—	—	18	—	—	—
38. Levski	30	27	90	26	9	35	62.50
39. Levskigrad	110	22	20	72	12	17	18.50
40. Ljubimec	12	—	—	8	—	—	—
41. Loveĉ	25	30	120	16	19	119	119.50
42. Miĉurin	85	—	—	58	1	2	1
43. Nova Zagora	15	6	40	10	5	50	45
44. Orjahovo	25	18	72	16	8	50	66
45. Panagjuriŝte	15	10	67	10	4	40	53.50
46. Pârvomaj	10	10	100	7	16	228	164
47. Pazarĝik	80	72	90	60	32	53	71.50
48. Petriĉ	30	—	—	20	8	40	20

49. Peștera	20	6	30	13	9	69	49.50
50. Pleven	90	66	73	60	16	27	50
51. Plovdiv	375	129	34	250	119	48	41
52. Poljanovgrad	30	10	33	20	1	5	19
53. Polski Trâmbeș	20	22	110	13	30	246	178
54. Popovo	35	6	17	23	6	26	21
55. Pordim, Plevena distr.	15	29	193	10	46	460	327
56. Prolom, Plovdiva distr.	6	—	—	4	—	—	—
57. Râjevo konare, Plovdiva distr.	15	—	—	10	—	—	—
58. Rozino	35	8	23	23	2	9	16
59. Ruse	70	110	157	46	41	89	123
60. Samokov	25	30	120	16	6	37	78.50
61. Sevlievo	40	41	102	27	6	11	56.50
62. Silistra	10	—	—	7	1	14	7
63. Sliven	45	24	53	30	11	38	46
64. Sofio — "Maksim Gorkij"	400	374	93	266	133	50	71.50
65. Sofio — la fervojistoj	170	147	87	113	30	27	57
66. Sofio — la poŝtistoj	36	29	80	24	12	50	65
67. Sofio — la blinduloj	22	22	100				100
68. Sofio — Bankja	30	22	70	20	5	25	47.50
69. Stanke Dimitrov	55	55	100	36	27	75	87.50
70. Stara Zagora	50	49	98	32	28	88	93
71. Štrákvevo	15	—	—	10	—	—	—
72. Tvištov	25	—	—	16	—	—	—
73. Târgoviște	17	—	—	11	2	18	9
74. Târnovo	75	70	93	50	46	92	92.50
75. Teteven	6	10	166	4	2	50	108
76. Tolbuhin	40	26	65	26	7	27	46.
77. Trjavna	15	11	73	10	11	110	91.50
78. Trojan	50	25	50	32	9	28	39
79. Trud, Plovdiva distr.	18	12	66	12	—	—	33.
80. Varna	355	245	69	233	15	6	37.50
81. Velingrad	30	212	40	20	9	45	42.50
82. Vidin	25	25	100	16	9	46	73
83. Vladimirovo, Mihajl. distr.	20	7	35	13	—	—	17.50
84. Vraca	55	66	120	36	33	100	110
85. Zimniza, Jambola distr.	6	—	—	4	—	—	—

KONGRESAJ NOVAĴOJ

LA UNUAJ DOKUMENTOJ

Antaŭ nelonge aperis la unua informa bulteno de la kongresa komitato en Târnovo. Ĝi enhavas ĝenerallajn informojn pri la antaŭviditaj kongresaj aranĝoj, loĝejoj, manĝejoj kaj la kondiĉoj por aliĝo al la kongreso. La aliĝiloj ankaŭ estas presitaj kaj dissenditaj al la societoj. La kongreskotizo ĝis 1. V. estis 10 lv., ĝis 15. VI — 15 lv. kaj post 15. VI. — 20 lv. La aliĝiloj nepre devas esti certigitaj de la loka societo. Unuopuloj, membrantaj en la kolekta grupo

al BEA skribos nur la numeron de sia membrokarto.

LA SOLENA MALFERMO

Atendu la gravan korekton en la programo! Anstataŭ la 10-an de julio je la 8 horo, kiel estas anoncite en la dua n-ro de BE, la solena malfermo okazos la 9-an de julio je la 18 h. en la somera teatro. Tuj post ĝi okazos la interkona vespero.

EKZAMENOJ

Dum la kongreso en Târnovo okazos ekzamenoj pri kapablo libere uzi

Esperanton (progresintoj) kaj pri instruado de la lingvo (instruistoj). La kandidatoj por la unua ekzameno pagas al la Asocio 20 lv. ekzamenkotizo kaj 30 lv. por la dua. La pet-skribojn oni devas sendi al la asocia kancelario ĝis la 1-a de julio k. j.

La skriba ekzameno okazos en Târnovo la 9-an de julio je la 9-a horo en la pedagogia lernejo. La buŝa ekzameno okazos la 11-an kaj 12-an de julio.

La regularo kaj la programo de la ekzamenoj estas sendotaj al la societoj per aparta cirkulero.

LA ANTIKVA ĈEFURBO NIN VOKAS

Gesamideanoj, aliĝu laŭeble pli frue, tiel vi faciligos la laborojn de la kongresa komitato.

La antikva, pitoreska urbo Târnovo, lulilo de la esperantismo en nia lando, kun siaj interesaj ĉirkaŭaĵoj, alloga kongresa programo kaj ekskursoj promesas al ni unu agrablan 34-an landan E-kongreson.

Ne hezitu, aliĝu tuj, gastamaj târnovanoj bonvenigonte atendas vin.

Ĉion por la kongreso adresu al: Esperanto-kongreso — Târnovo.

SUPERA DISTINGIGO DE ESPERANTISTOJ

Antaŭ kelkaj monatoj la Prezidentaro de la parlamento distingigis okaze de la 15-a datreveno de la kontraŭfaŝista ribelo per ordenoj la partoprenintojn en la kontraŭfaŝista batalo kaj en la stabiligo de la popola regotenco kaj en la konstruado de la socialisma ekonomio. Inter la ricevintoj de ordenoj estas ankaŭ multaj esperantistoj. Juj el ili estas distingigitaj pro ilia longdaŭra E-agado. Tiu ĉi supera distingigo de niaj samideanoj montras ke la E-movado en Bulgario ĉiam estis parto de la popola movado, ke la bulgaraj esperantistoj estas portantoj de la popolaj idealoj kaj aktive partoprenas en la ĝeneralaj popolaj movadoj por pli bela vivo, por paco, por feliĉo. Ĝi montras ankaŭ ke nia E-agado ricevis oficialan rekonon. Tiu ĉi fakto estas gravega kaj ni devas bone pritaksi ĝin.

Ĉi sube ni komencas la publikigon de la

nomoj de la distingigitaj samideanoj, kion ni daŭrigos en la sekvantaj numeroj de BE. Ni petas la estrarojn de la lokaj societoj sciigi la ĝustajn nomojn de siaj membroj, ricevintaj ordenojn, la nomon kaj la gradon de la ordeno. Ni publikigos ilin laŭ la ordo de la ricevo.

Por esti pli klara al la legantoj la grado de la distingigo ni priskribas tie ĉi ĉiujn ordenojn ekzistantajn en Popola respubliko Bulgario, ordigitaj laŭ ilia valoro.

Plej supera ordeno estas ordeno «Georgi Dimitrov». Post ĝi sekvas: «Popola respubliko Bulgario» (3 gradoj), «9-a de septembro 1944» (3 gradoj), «Por popola libero 1941-1944» (2 gradoj), «Ruĝa standardo», «Ruĝa standardo de la laboro», «Popola ordeno de la laboro» (ora, arĝenta kaj bronza), «Kiril kaj Metodij» (3 gradoj).

- | | |
|-------------------------------------|--------------------------------|
| 1. Georgi Karaslavov (Sofio) | — «Georgi Dimitrov» |
| 2. Todor Pavlov (akademiano, Sofio) | — «Georgi Dimitrov» |
| 3. Nikola Aleksiev (Sofio) | — «Popola respubliko Bulgario» |
| | — I grado |
| 4. Boris Vapcarov (Blagoevgrad) | — «Popola respubliko Bulgario» |
| | — I grado |
| 5. Sava Dâlbokov (Pleven) | — «Popola respubliko Bulgario» |
| | — I grado |
| 6. Boris Nikolov (Kolarovgrad) | — «Popola respubliko Bulgario» |
| | — I grado |
| 7. Georgi Nadjakov (Sofio) | — «Popola respubliko Bulgario» |
| | — I grado |

La 4-an de marto la negrandan, sed sufiĉe oportunan montardomon vizitis alpinista lernogrupo de 30 personoj. Min interesis, ĉu inter ili estas esperantisto.

— Ne estas — sekvis respondo.

Ve! Mi ja atendis sopire jesan respondon.

Iom poste oni petis de mi leterpaperon kaj ian libron, kiu povus servi kiel submetilon. Sur la tablo kuŝis Esperanto-gazeto kiun mi transdonis. Momenton poste mi aŭdis demandon: «Kiu tie ĉi estas esperantisto?» Jen, alproksimiĝas la kuracisto de la grupo d-ro M. kun la gazeto en la mano. Frate ni premis la manojn kaj ekparolis. Ĉiuj eksilentis kaj aŭskultis la nekonatan lingvon, dum ni vigle, ĝoje interŝanĝis la unuajn demandojn-respondojn.

La saman vesperon devis esti celebrata la liberigo el la turka jugo. Ni, la du esperantistoj, decidis fari iom da propagando por nia amata lingvo. Tiucele mi, kvankam mallerte, preparis Esperantan standardeton, kiun ni surnajlis super la turismaj propagandiloj. Post la programo ni kantis esperantlingve la kanton «Al la virinaro tutmonda».

Evidentiĝis ke en la grupo de 30 personoj, 6 aŭ 7 lernis Esperanton aŭ eĉ nun lernas, sed ne kuraĝis publike sin anonci. Prezentinte al ili la nialandajn kaj alilandajn Esperanto-gazetojn, mi profitis la okazon reveki ĉe ili la intereson. Ili demandis pri lernolibroj kaj promesis rekomenci la lernadon. Iuj petis, ke mi sendu al la esperantista grupo en ilia loĝloko esperantajn kantojn, kion mi promesis fari.

Nia improvizita verda standardo restis sur la muro kiel konstanta propagandilo. Sed mi volas starigi la demandon: ĉu ĝi ne estiĝu komenco de

konstanta Esperanto-propagando en turismaj medioj.

Jen, la turismo en nia lando pli kaj pli vigliĝas, same kiel la esperantismo. Bulgarion, niajn montojn vizitas ĉiam pli kaj pli multe da alilandaj gastoj.

Mi faris aludon al s-ano d-ro M., ke li petu pri propagandaj materialoj, per kiuj estu ornamitaj la montara domo. Eble ankaŭ esperantaj gazetoj (eĉ malnovaj) estos oferitaj. Multaj estas ekinterestigataj. Grupo da studentoj helpe de mi lernis la gramatikon nur en duona tago. La montardomoj povus estiĝi «infektejoj» pri Esperanto-eklernado!

Tute ne estus superfluaĵo esperantlingvaj rubrikoj en la organo de la bulgaraj turistoj. Tiu ĉi gazeto trovas unuan lokon en la montodomoj.

Salutojn el Rila-neĝoj al ĉiuj gesamideanoj!

Rila, 13.3.1960

Ruja Ĉerneva

UNESKO OFICIALIGIS LA CELEBRADON DE ZAMENHOF

La sekretariato de UNESKO en Parizo komunikis, ke la Plenumkomitato de tiu ĉi organizaĵo decidis memorigi en 1960 ses grandajn personecojn de la homaro, inter ili Zamenhof, la aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto. La ĝenerala direktoro de UNESKO informis pri la decido ĉiujn registarojn de la ŝtatoj-membroj kaj invitis ilin partopreni la celebradon.

Tiu ĉi historia decido de la supera monda organizaĵo por edukado, scienco kaj kulturo signifas la plej elstaran rekonon, iam ajn esprimitan al Zamenhof pro la genia verko, kiun li donis al la homaro, kaj pro la noblaj ideoj de humanismo, kiujn li ligis al ĝi.

MEMBROJ SUBTENANTOJ

14. Georgi Karaslavov — Sofio
15. Prof. Petâr Dinekov — Sofio
16. Ljuben Kasčiev — Kolarovgrad
17. Mihail Popov — Sofio
18. D-ro Stojan Moraresku — Sofio
19. Ivan Marinov Georgiev — Sofio
20. Canko Murgin — Sofio
21. Asen Grigorov — Sofio
22. Krâstjo Karucin — Sofio
23. Boris Kavalgiev — Ruse

POR LA ESPERANTO-DOMO

Asenovgrad. La iniciato de la CK de BEA por konstruo de nia propra E-domo estis renkontita kun entuziasmo de la esperantistoj en Asenovgrad. Tuj post la ricevo de la markoj-brikoj la estraro ekagis.

Pro la graveco de la afero estis kunvokita speciala kunveno, en kiu oni pridiskutis la manieron de disvendado de la markoj. Komence iuj samideanoj, aŭdinte la fiksitajn sumojn de CK de BEA al nia societo de 8,000 levoj, ektimis kaj esprimis dubojn pri la sukcesa disvendado, des pli ke la limtempo estas tiom mallonga. Sed post kiam la prezidanto kaj aliaj ĉeestantoj parolis pri la neceso kaj graveco de tia domo por nia Esperanto-movado, ĉiuj konvinkiĝis kaj esprimis diversajn proponojn pri la disvendado de la markoj-brikoj. Anoncis sin samideanoj kiuj tuj aĉetis po 50 pecoj, aliaj po 40 k. t. p. Kvankam la agado estas ankoraŭ en sia komenco sed progresas bone kaj multaj samideanoj kiel: Mihail Arabaĝiev, Georgi Angelov, Vlaŝo Nalbantov kaj aliaj laboras tre aktive.

At. Gaev

La ekzemplo de asenovradanoj estas imitinda. Konsiderante la gravecon de la demando, ĉiuj societoj devas serioze pridiskuti la eblajn metodojn kaj formojn de agado. Tre gra-

MAGNETOFONA SERVO DE BEA

Ĉe multaj Esperanto-organizaĵoj jam funkcias magnetofonaj servoj. Nia asocio ankaŭ ne postrestas en la utiligo de la magnetofono por la celoj de nia movado. Antaŭ nelonge fako «Propagando» de nia asocio kreis nian magnetofonan servon. Ni jam posedas magnetofonon «Smaragd», kiu havas du rapidecojn — 9.5 cm/sek. kaj 19 cm/sek., mikrofonon kaj dekon da magnetofonaj ben-
doj.

Per magnetofonaj surbendaĵoj oni povas sendi Esperantan parolon ĉien. Oni povas aŭdi alilandan esperantiston en ĉiu klubejo, en ĉiu domo, je konvena horo, ellerni memstare Esperanto-kantojn kaj oni povas konservi la plej valorajn prelegojn por estontaj generacioj.

Ni jam komencis registri prelegojn, radiodissendojn, kantojn, teatraĵetojn kaj ĝenerale interesajn sondokumentojn en aŭ pri Esperanto. Baldaŭ nia bendoteko havos dekojn da registraĵoj.

Ni petas ĉiujn societojn kaj samideanojn, kiuj posedas magnetofonon tuj kontaktiĝi kun ni por ke ni priparolu nian kunlaboron. Ni nun pretigas la unuan liston de la posedantaj registraĵoj.

La unua publika agado de la servo estas la sonigo de la salono de nia ekspozicio aranĝota okaze de nia 34-a Bulgara Esperanto-kongreso.

Adreso: Magnetofona servo ĉe BEA, p. k. 66, Sofia, Bulgario.

Nik. Nikolov

gvidanto de Fakoj «Propagando» ĉe CK de BEA

ve estas atente eluzi la eblecojn por disvendado de la markoj-brikoj inter la multnombraj simpatiantoj de Esperanto kaj inter la multnombra publiko.

NIKOLA PETROV BEĈEV

Nikola Petrov Beĉev naskiĝis la 25-an de oktobro 1915 en vilaĝo Karabunar, distrikto de Pazarĝik.

Unu jaron li lernis en la gimnazio en Pazarĝik kaj unu jaron en la komerca gimnazio en Plovdiv. Kiam li estis en IX klaso li estis forigita kiel komunisto kaj estis devigita reveni en sian naskiĝvilaĝon. Kiel gimnaziano li studis fervore la marksismon-leninisman.

Beĉev aktive partoprenis la socian vivon de la vilaĝo, abstinulan socion, teatran trupon k. a. Li dediĉis sian tutan vivon por plifirmigi la influon de la Komunista partio kaj de la Komsomolo kaj tiamaniere krei la amikecon inter la junuloj kaj la unuecan fronton.

Beĉev lernis aŭtodidakte Esperanton en Karabunar en la periodo 1934-1936. Li multe korespondis kun esperantistoj el Sovetunio, Francio, Kanado kaj multaj aliaj landoj en la tuta mondo.

Dank' al sia Esperanta korespondado li trovis sian edzinon Canka, kiu estas el urbo Isperih. Nun ŝi loĝas en urbo Silistra. Lia filo Vladimir estas studento en Sofio.

Kiel soldato en 1931 li daŭrigis sian Esperantan agadon malgraŭ ke oni faris al li multajn malhelpaĵojn, pro ĝi eĉ unufoje oni batis lin tre kruele.

Nikola Beĉev estis korespondanto de multaj progresemaj ĵurnaloj kaj gazetoj, kiel «Ĵar», «Ĵupel» k. a. Li estis tre legema junulo kaj tre ŝatis legi precipe antireligiajn librojn. Li



fundamente lernis la verkojn de la fama angla naturalisto Ĉarlz Darwin.

Nikola Beĉev estis gvidanto de la junulara kaj poste de la partia (komunista) grupo en la vilaĝo.

Nikola Beĉev fariĝis eksterleĝulo la 10-an de februaro 1942. Li unua en la regiono kune kun Metodij Haĝijski kaj Ljuben Dorĝikov formis la unuan partizanan taĉmenton en montaro Sredna Gora kaj poste formis partizanan brigadon «Koĉo Ĉestimenski», kies brigadestro li estiĝis sub la partizana nomo Donĉo. Li estis sentima kaj kuraĝa batalanto kontraŭ la faŝismo.

La 16-an de oktobro 1943 li estis inside mortigita apud vilaĝo Boŝulja, distrikto de Pazarĝik, plenumante iun taskon. Tiam li estis sola. Li pereis tre juna, sed pereis kiel sindona batalanto por pli feliĉa kaj libera vivo de la popolo.

45-a UNIVERSALA KONGRESO EN BRUSELO

La 45-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1960 en Bruselo, Belgio.

De la 27-a ĝis la 30-a de julio en Arnhem (Nederlando) okazos antaŭkongresa renkontiĝo. Antaŭ la universala kongreso okazos ankaŭ la 16-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO — en Roterdamo (Nederlando) — de la 23-a ĝis la 30-a de julio, kaj internacia Ĉe-seminario en Bruselo — de la 27-a ĝis la 30-a de julio.

Laŭ decido de la Estraro de U.E.A. la universala kongreso laboros en du sekcioj: 1. Esperanto en la lernejoj, kaj 2. Kultura kontribuo de Esperanto al la Granda Projekto de UNESKO Oriento-Okcidento.

Estos organizitaj du ĝeneralaj kunvenoj: 1. La nuntempa Esperantomovado, kaj 2. Diskuto pri: a) Estrara raporto, b) raportoj de la fakaj

asocioj pri la fakkunvenoj okazintaj dum la kongreso.

Fakaj kunvenoj anoncis: Internacia ligo de esperantistaj instruistoj, Internacia asocio de juristoj-esperantistoj, Esperanto-ŝakligo internacia, Internacia georgafa asocio, Studenta tutmonda esperantista ligo, Internacia federacio de la esperantistoj-fervojistoj, Internacia scienca asocio esperantista k. a.

En la kadro de la 45-a universala kongreso de Esperanto okazos ankaŭ la 5-a internacia infana kongreseto kaj la 30-a internacia kongreso de la blindaj esperantistoj.

Dum kaj post la kongreso estos organizitaj interkona vespero, teatra vespero, muzika vespero, kongresbalo, bankedo, filmprezentadoj kaj ekskursoj.

La verkistoj-esperantistoj povas partopreni la belartan konkurson 1960.

SOMERA PEDAGOGIA SEMAJNO

Sub la aŭspicio de UEA kaj la Nacia UNESKO — komisiono por Jugoslavio, Lerneja komisiono de JEF kaj en kunlaboro kun Jugoslavia asocio de pedagogoj-esperantistoj, aranĝas ĉi jare la Duan someran pedagogian semajnon. Post dujaraj spertoj en la realigado de decidoj, akceptitaj dum la Unua SPS en Kranjska gora en la jaro 1957, montriĝis la bezono pritrakti la problemon, kiu ekestas en la lernejo, kie Esperanto estas instruata, post akiro de aktiva lingvoscio. Krom tio estos utilaj interŝanĝoj de spertoj inter diverslandaj pedagogoj pri la instruado al lernantoj de elementa lernejo.

Ĉijara internacia lerneja kampanjo de UEA donas al tiu ĉi aranĝo

ankoraŭ aldonan taskon organizan. Tiel estos pritraktataj ankaŭ la problemoj pri la rolo de esperantistaj organizaĵoj, precipe de UEA kaj TEJO kun aliaj landaj sekcioj.

Pro la graveco kaj aktualeco de la problemoj pritraktotaj, la aranĝo havos serioze laboran karakteron, kio ne eskludos ankaŭ distron kaj amuzon dum libera tempo. Komforta junulara domo, lokita en arbaro ĉe la bordo de montara lago Bohinj, ĉirkaŭata de majestaj montsuproj, brilantaj en suno, ĉe la fonto de ĉefa jugoslavia rivero Sava kaj agrabla somerrestadejo kaj ripozejo, prezentos apartan travivaĵon por la partoprenantoj.

Kiu partoprenos? En la unua vico la instruistoj kiuj instruas al la infanoj en la lernejoj (el Jugoslavio, Danlando, Finnlando, Nederlando, Francio, Britio, Svislando, Svedio, Pollando, Bulgario kaj aliaj estos ankoraŭ invitataj). Poste la junularaj esperantistaj grupoj aŭ almenaŭ iliaj gvidantoj laborantaj en lernejoj, kiuj alportu siajn spertojn en la organiza laboro, kultura, eduka, distra kaj amuza vivo. Inter ili aparte estas invitataj la redaktoroj kaj plej aktivaj kunlaborantoj en «Grajnoj en Vento».

Antaŭvidita kvindeko da instruistoj, kiuj en prelegoj kaj diskutoj pri traktos prezentatajn temojn, kvindeko da gejunuloj, kiuj praktike prezentos sian laboron en lernejoj per kulturaj aranĝoj, ekspozicioj, distraj, sportaj kaj aliaj ludoj, estas garantio, ke kolektiĝos interese ligita internacia kolektivo kun entuziasma agordo en amika esperantista atmosfero, kiun ni jam spertis en Frostavalen, kian spertis la partoprenintoj en Kranjska gora kaj aliaj tiaspecaj esperantistaj aranĝoj.

La programo konsistos el:

La ĉefa temo: «La praktika apliko de Esperanto en lernejo post akirita lingvoscio». a) ĝenerala rolo de Esperanto en lernejo kaj b) resumo de problemoj ligitaj al ĝi.

— Kompletigado de instruprogramo.

— Esperanta literaturo kiel kompletiga legaĵo.

Ekspozicio de legolibroj, bildverkoj, turismaj prospektoj kaj broŝuroj, ilustritaj gazetoj kaj revuoj, komercaj prospektoj, UNESKO afiŝoj, esperantaj revuoj ktp.

Ekspozicio de materialoj, kolektitaj el lernejoj por kompletigado de instruprogramo por unuopaj instruobjektoj.

— Kultura kaj kleriga laboro en lernejoj.

— Interna vivo ĉe lerneja grupo.

— Esperantista grupo kaj aliaj junularaj organizaĵoj.

Ekspozicio de literaturo poezia, drama, muzika, ideoj studa kaj organiza, lerneaj gazetoj, junularaj gazetoj esperantistaj, Grajnoj en vento kaj aliaj materialoj bezonataj en grupa laboro, kun prezento de celadoj de aliaj junularaj organizaĵoj por ni interesaj (naturamikoj, sportaj, ruĝa kruco, feriaj, laborbrigadoj kaj civila servo ktp.).

Rim.: Helpo en ekspozicia materialo de posedantoj kaj precipe partoprenantoj varme estas petata!

— Rolo de lernantoj, gepatroj, instruistoj, lerneaj instancoj kaj aliaj organizaĵoj en lerneja kampanjo.

— Metodikaj spertoj en Jugoslavio kaj aliaj landoj, kun raportoj kaj provlecioj.

— Diskuto pri ILEI en lerneja kampanjo.

— Diskuto pri TEJO en lerneja kampanjo.

Konferenco de Grajnoj en vento.

— Kulturaj aranĝoj de junularo.

— Amuzoj kaj dancvesperoj.

— Prezento de filmoj, lumbildoj kaj sonbendoj el diversaj landoj.

— Tendaraĵoj kun babilado kaj ludoj.

Unu aŭ du tuttagaj ekskursoj al la montoj, aŭ rava ĉirkaŭaĵo, bano en la lago kun dispono de kelkaj boatoj kaj aliaj sportaj rekvizitoj, sunbanoj en picea arbaro, ĝuo de montara kvieto.

Restadkondiĉoj: la plaĝuloj loĝos en la Domo, la junuloj en la tendoj kun du litoj komforte ekipitaj. Kvarfoja manĝado komuna en la Domo.

Restadkostoj: Kompleta prizorgo 600 dinaroj aŭ egalvaloro. Por prelegantoj kaj aliaj aktivaj kunlaborantoj ni verŝajne sukcesos prizorgi senpagan aŭ rabatitan restadon.

La interesatoj anoncu sin al Jugoslavia Esperanto Federacio, Ljubljana, Poŝtfako 275, Jugoslavio.

RIKOLTO

Al la sep komunistoj, mortpafitaj kaj
forĵetitaj en la maron ĉe Galata en 1944 jaro.

Paŝadis ili sur vojeto luna
kaj venis ĝis la bordo kun rapid'.
Min tim' obsedis. Kaj en la mallumo
vizi' ekstremis antaŭ mia vid'.
Ekvolis mi forkuri. Sed atendu —
el vic' ilia unu dum momento
aliris min, etendis brakon li. . .
Belegaj, bonaj ili estis pli
ja kiaj povas esti ĉiuj bravaj
ĉe la teruraj horoj de l'mortpafo.
Rompiĝis ondoj ĉe iliaj kruroj,
la maro eksilentis en humil',
iliajn kapojn la haltinta luno
tuj kronis per la aŭreola bril' . . .

Sep ili estis. Sep tre junaj homoj
fiere staris elmetinte bruston.
— Jen estas ĝi' — sonora eĥis kri' —
kaj ĉiuj ekrigardis malproksimen
post la arĝenta bord'.

Kaj mi divenis:
el or' fandita en vastaj' radia —
por foj' unua ili revon sian
ekvidis tra la reto de l'branĉaro . . .
Renaskiĝinta tio estas land'
kaj ĝia nomo estas
land' Bulgara!
— Jen estas ĝi! — la luno sin
aŭdigis. . .

La lasta viro gestis per la man'
kaj pove diris
— Rikolto estas jam'!

Ekiris ni en vic' batala jen.
Ne turnis min, mi marŝis en silent'.
La luno eksveninta pro la laco —
de l'voj' revenis kaj ekdormis pace.
Ne turnis min, kaj ĝis leviĝ' de l'suno
mi atendente vagis en mallumo.

En orient' ekstremis la aŭror'
kaj mian vojon ĝi lumigis for.
Ador' alblovigis je matura greno.
Haltinte tuj mi turnis min apenaŭ.
Post mi sur voj' paŝadis rikoltistoj.
Tra l'grenkamparoj iris rikoltistoj.
Virinoj, viroj — aŭroro same brilaj.
Virinoj, viroj — tre mildaj, beltaliaj.

Sed ĉu revidos mi en tiu hor'
la virojn sep de la arĝenta bord'?

Post mi sur voj' paŝadis rikoltistoj.
Descendis de l'montetoj rikoltistoj.
Rapidis al grenkampoj rikoltistoj. . .
Ne rikoltilojn — radiojn en la manoj
tenadis ili, rikoltis kaj ekkantis . . .
Kaj tuj —
ĉe l'rikoltistoj vidis mi
la virojn sep kun ili kanti pli.
De kant' ilia la vastaj' reeĥis —
kaj tre feliĉaj ili estas jam
ja kiaj povas ĉiuj bravaj esti
post venko super malamika band'!

Tradukis: At. Lakov

Ĉ u d o m i r
Ĉ I T R O N E

Rigardante dum la festotagoj kiel
ĉiu aĉetas por si citronojn por kotle-
toj mi rememoras pri mia vojaĝo tra
Italio. Pri mia geedziĝa vojaĝo.

Jam antaŭ la ekveturo, mi paradas
antaŭ mia edzino kaj parolas:

— Mice — diras mi, — ni iros —
diras mi — unue en Italion. Mi — di-
ras mi — mi scias iom de la franca,
iom de la germana, sed ankaŭ la
italan mi ekkomprenos. Mi ne timas.
Mi scipovos ĝin tuj — diras mi. Kaj
ŝi:

— Ne timu, Guce — diras ŝi — facile afero! Ni aĉetos — diras ŝi — unu itala-bulgaran frazaron, ni legos dumvoje kaj ellernos la plej necesan. Ĉi ne estas tiel malfacila! Kaj Italio estas — diras ŝi — la dieca Italio! Tiuj lazuraj bordoj, tiuj mirindaj ĉieloj, ni promenados — diras ŝi — ĉiam ĉirkaŭprenitaj, ni rigardos plezure — kion ni ankoraŭ pridiskutadas?

Kaj ekfrapas min delikate sur la nazon.

Ke la ĉieloj estos mirindaj, mi kredas, pensas mi: ke la bordoj estos lazuraj, same, tamen ekmanĝemos ni ion, mi diru, ekdeziremos ni ion, kaj ne komprenante eĉ vorteton, ni frapos niajn cerbojn, ni svingos niajn brakojn, ni rigardaĉos kaj klarigados. Kaj kiel ĝin mi pensis, tiel okazis.

Dumvoje, ja ni estas jungedzoj, estu damnite — aho-ihoo, kisado-brakumado, ĉi tio kaj tio, ni eĉ ne malfermis la frazaron kaj enŝutis nin nerimarkeble en Venecion.

Ni naĝis iom per gondolo, trarigardis San Marko-n kaj la palacojn de la doĝoj, ni fotografis nin sur la placo kun kolombetoj sur la ŝultroj, ĝis la edzino iun tempon komencis paroli:

— Oh, — diras ŝi, — Guce, skrapas en mia stomaketo. Mi malsatiĝis — diras ŝi.

— Bone — repsondas mi, — Muce. Ni iru tiam — diras mi, — ni serĉu restoracion.

Ni turniĝis dekstren kaj maldekstren, ĉirkaŭiris, ĝis bonodoris al ni raguo el iu entrepreno, kaj ni ŝoviĝis internen. Renkontis nin la servisto, montris al ni manĝotablon kaj enmanigis al ni la menuon. Mi rigardas vicigitajn sur ĝi diversajn manĝaĵojn, sed, ĉar ili estas ja manskribitaj kaj kun skribplektaĵoj, mi ne povas kompreni la skribaĵojn!

Mi enmanigas ĝin al Muce:

— Vidu — diras mi, — elektu unue por si, ĉar vi estas pli malsata.

— Vi, vi — diras ŝi — legu, kaj mi aŭskultos.

Mi rigardas, frato, rigardaĉas, nenion mi povas tralegi kaj redonas ĝin.

— Sed, vidu — diras mi, — Mucinka, elektu por vi ion, ĉar al mi pro la vojo la okuloj iel larmetas kaj mi ne vidas. Tralegu — diras mi — ja ĉu vi ne aĉetis por vi frazaron en Sofio?

Rigardas Muce, silabumas, penas, kvazaŭ solvus rebuson kaj plej poste sukcesis tralegi la vorton «montanara». «Montanara», mi pensas, devenas de «montan» — montaro. «Montanara»! Montara manĝaĵo ĝi estos, tiel. Ĝuste por ni drjanovanoj (el bulgara vilaĝo Drjanovo).

— Hej, garsono — vokas mi — alportu du «montanarojn» kaj okazu kio ajn.

Perdiĝis la knabo kaj post iom da tempo alportas por ni du supojn legomplenajn, du bulgarajn supojn, kvazaŭ kuiris ilin iu kuiristo el Ljaskovec. Ni formanĝis ilin appetite, mendis ankoraŭ po unu, vespere ree, sekvan tagon denove po du montanaroj, ĝis ni supiĝis, tiel diri, ĝis la subbrakoj en Venecio kaj ekveturis per vagonaro pluen.

Ni alveturis en Florencon. Vasta urbo, antikva urbo, antikvaj monumentoj, antikvaj preĝejoj — ĉio ĝia estas bela! Tie en la menuo ni sukcesis tralegi ankoraŭ ion. «Eskalopine» oni nomas ĝin. Mi rememoris, ke en franca «eskalop» signifas kotleton. Ni kuraĝiĝis, mendis kaj montriĝis la samo. Etaj kotletoj kun saŭco. Ni forglutis po unu montanaran supon, tiel, kaj po unu porcion da «eskalopine», gapis, gapis malmulte kaj — ambaŭ al Roma.

Roma — urbo kiel urbo. Pli vasta ol Drjanovo. Antikva urbo, antikvaj monumentoj, antikvaj preĝejoj kaj

kareco. Aliel — ĉio ĝia estas bela. Tie ni ne trovis skribite «eskalopine» en la menuo. Ni formanĝis ree po du montanarojn kaj ekveturis al Neapolo.

En la vagonaro ni finfaris nian tagmanĝon per balkana sekfromaĝo. Ni elvagoniĝis en Neapolo kaj mi diras al la ŝoforo:

— Knabo, hotelon!

Ni ĵetas nin en la taksion, ekveturigas li nin kaj ni haltas antaŭ iu konstruaĵo. Ekstere sur la pordo skribite: «Albergo».

— He, Muce — diras mi al mia edzineto — kia estas tiu ĉi afero? En Venecio — diras mi — en hotelo Albergo ni tranoktis, en Florenco same, en Roma denove kaj tie ĉi la samo. Ĉu ja ĉiujn hotelojn en Italio — diras mi — tiu ĉi eksplaatanto Albergo posedas? Ĉu ties ili estas?

Kaj ŝi laŭte ridas kaj respondas:

— Albergo — diras ŝi — signifas hotelon en itala. Ĝi ne estas nomo de la homo. Tiel — diras ŝi — estas skribite en la frazaro.

Kiel ajn estu, ni tranoktis en tiu ĉi Albergo kaj matene ni marŝis en la urbo. Vasta urbo, antikva urbo, monumentoj, preĝejoj — ĉio estas bela. Iun tempon ni aperis ĉe la bordo. Vidinte ĝin Muce, manplaŭdis kaj diskriis:

— Ah, — diras ŝi — Guce-e-e! . . . Kiaj lazuraj bordoj! Kiaj bluaj ĉielo! Nul — diras ŝi, — ni naĝu iom per boato je rememoro.

— Ni naĝu iom, mia birdido, kial ni ne naĝu iom? Ĉu ja ni ne alveturis tien ĉi elspezi monon?

— Ni luos — krias ŝi — he, tiun, la blankan boaton, ni sidiĝos enen, ni ĉirkaŭprenos nin kaj ĝi lulos, lulados nin. . .

Kaj ree manetendis frapi min sur la nazon, sed ne trafis, kaj tuŝis mian malsupran lipon kaj ĝi faris: pljok!

— Ĝi lulos nin — diras mi, — ĝi

lulados nin, sed se nin kaptos la marmalsano?

— Ni aĉetos citronojn — diras ŝi — kaj nenio okazos al ni.

Ni ekiris serĉi citronojn.

Ĉi tie citronoj, tie citronoj, nenie vidiĝis ili. Ni ekiris al granda magazeno. Ni ekiris kaj mi pensas:

— Citrono, mi pensas, en franca signifas sitron, en germana — citron, en itala konvenas esti aŭ ĉitron, aŭ ĉitrone. Aliel ne povas esti! Certe estas ĉitrone! Pli bone ŝajne konvenas.

Mi rapidas diri antaŭ Muce kaj montri miajn sciojn en itala kaj mi mendis laŭtvoĉe:

Donu al mi — diras mi — mi petas, kelkajn «ĉitrone»!

Sed la vendisto rigardas min kaj palperbrumas larĝsvinge.

— «Ĉitrone» — diras mi — «ĉitro-ne»! — kaj mi premas pugnon por montri la grandecon.

Kaj li rigardas min time-time kaj levas ŝultrojn.

— Oni ne nomas ĝin, verŝajne «ĉitrone» — diras Muce al Guce — aliel ĝi estas, verŝajne.

— «Sitron»! — krias mi france — Citron! Ĉitrone!

Kaj li ree rigardas grandokule kaj nenion eldiras. Mi ambiciiĝis. Tamen io simila devus esti, pensas mi, ĉu ni ne povos interkompreniĝi. Plej poste mi vicigos tutan nian alfabeton kaj trafos ĝin. Kaj mi komencas vicigi al la vendisto:

— Atrone, bitrone, vitrone, gitrone, ditrone, etrone, ĵitrone, zitrone itrone. . .

Kaj li, la malsaĝulo, vera malsaĝulo, denove nenion komprenas.

— Kitrone — daŭrigas mi — litrone, mitrone, nitrone, otrone, pitrone. . .

— Haltu — krias Muci — vi ja en patronon aliformigos ĝin. Haltu! Ne penadu!

Sed, ĉu mi ne povis — diras mi — Muce, ĝin trafi ĝis nun? Ĉu eblas?

Sed li — krias mi, — li estas stultulo kaj nenion komprenas. Ĉu povas, la stultulo, vera stultulo, ne kompreni ĝis nun, ke mi postulas «limonojn».

— Ha-a-a — tuj li aŭdigis sin — limone! ... Si, si, sinjore! Abiamo, sinjore! Si, si! ...

Manetendis, demetis iun tukon kaj montriĝis plena kesto da citronoj

— Sed, ĉu ankaŭ vi nomas ilin limonoj, he? — ekkriis mi. — Diru tiel, he, frato! Tiel diru, ke ankaŭ en itala

estas same kiel en bulgara, he, ke mi ne penadu! Ankaŭ mi tiel pensis — diras mi, — sed jen! Ja kiel ni estas parencoj — diras mi — kial ni estas parencoj, ĉu ne ĉar ni similas unu al la alia, kaj laŭ sango, kaj laŭ moroj, kaj laŭ kutimoj — kaj eĉ laŭ limonoj, ni diru, ni similas unu al la alia.

He, tiel diru!

El bulgara: Stefan Kiraĝiev

BLANK-DANUBO

Teksto: Ivan Vazov

Harmoniigis: Peter Bojaĝiev

Moderato

Blank-Da- nu- bo gaj- fa- vo- ra- plaŭ- das sen dan-
 ĝer' kaj Ra- dec ki fen- das
 a- rajn on- dojn kun fl- er' or'

Blank-Danubo gajfavora
 plaŭdas sen danĝer'
 kaj Radecki fendas orajn
 ondojn kun fier' () (2)

Tamen kiam rimarkiĝas
 bord' de Kozloduj,
 korno en la ŝip' aŭdiĝas,
 flag' ekflirtas tuj. () (2)

Saltas jam bulgar-junuloj
 — brava avangard' —
 frunte — orleonoj brulaj,
 ĉe l' okuloj — ard'! () (2)

Botev vigle stariĝanta,
 kun ponard' ĉe l' man',

al la ŝipa komandanto ()
 diras kun ekflam': (2)

«Mi — vojevodo, kun bulgara
 bando je ofer'
 flugas verŝi sangon klaran ()
 por popolliber'. (2)

Bulgarion ni alflugas
 helpi per ribel',
 savi ĝin el peza jugo ()
 estas nia cel' (2)

Ŝipon vian al ni lasu
 pace kun favor', ()
 ke anaro mia pasu (2)
 al la hejma bord'.

El bulgara: Stefan Kiraĝiev

LUMPORTANTO

(Al Majstro L. L. Zamenhof — okaze la 100-jara datreveno de lia naskiĝo)

... Malluma nokto sternis malhelan vualon sur la terglobon... Ĉie malamo, ĉie mizero, regis mallumo en la mond'... Frat' fraton perfortis, popol' popolon atakis, — pereis ŝtatoj, — atencoj, suferoj senfin'... Kie, do, estis la hela prudento? — Ĉu mankis amo en la mondo? ... Profunda, misprofeta, tempesta nokto... noktumis la mond'...

Eta «lampiro» — «D-ro Esperanto» — ekflagris tra densa mallumo kaj konfuzis la febran sonĝon de l'homaro. — Timige ĝin alparolis la reĝo de l'mallumo — la gufo kaj indigne diris.

— He, ci, sensignifa fiinsekto, kiel ci kuraĝas flagrante malatenti la ordon de l'eterna nokto? — Laŭ la leĝoj de l'mallumo ci devas morti! ...

— Kial morti, ĉu mi kulpas? —

— Jes, ci krimas.

— Kiel mi krimas?

— Ci lumas.

Ne ektimis la lampiro. Ne obeis la minacon de la nigra gufo. Jen minacite, jen persekutite, ĝi tamen flagradis senlace. Ĝin postsekvis miloj da similaj lampiroj el la tuta mondo kaj la komenca flagrado fariĝis jam konsiderinda lumado. Ili rapide unuiĝas — aligas siajn lanternetojn, establas altajn Esperanto-lumturojn kaj lumas, lumadas senĉese...

Ho, vi etaj lumportantoj, esperantoj, pacamantoj, ne malesperu! Freŝaj fortoj jam alvenas helpe, — subtenu la lumadon! — Falonta estas baldaŭ la potenco de l'mallumo — sindone lumu, lumu! Ĉar lumon bezonas la homo — la mondon savos la lumo!

P. Kamburov

NI LIMGARDISTOJ

Fieraj ni staras en nokta silento, ni gardas la limon de nia Patri'. Kaj nin, ne malhelpos la pluvo, nek vento — ni vigle postenas sub stela radi'.

Ni gardas la novajn konkerojn tre grandajn de nia libera, heroa popol' kaj ĝi nin dankeme en gloro prikant — la barojn venkinte per peno kaj vol'.

Ni gardas la sonĝon de niaj infanoj, — la pacan laboron en tuta la land'. Ni gardas per niaj okuloj kaj manoj vin ankaŭ, amikoj, en faliĉa rand'.

Banditojn danĝerajn ni lasos neniam transiri la limon de nia Patri', kaj firme postenas ni ĉiuj obstine en nomo de l'novo kaj belo en viv'.

Fieraj ni gardos en nokta silento en pret' kontraŭ ĉiu provok' kaj rikan', ĉar limogardistojn komuna fratsento kun nia popolo kunligas per am'.

Mladen Danev

PUBLIKIGAĴOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Oficiala bulteno, N-ro 1/1959. Sepa oficiala aldono al la Universala Vortaro. Prezo 2 steloj (0,50 ned. gld.).

Oficiala bulteno, N-ro 2/1959. Pri la vortfarado en Esperanto, de J. R. G. Isbrucker (prezidanto de la akademio). Prezo 6 steloj (1,50 ned. gld.) — Recenzon pri tiu ĉi verko ni donas aliloke en nia gazeto.

La du eldonaĵoj estas livereblaj de Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, Eendrachtsweg 7, Nederlando.

PRI LA VORTFARADO EN ESPERANTO

de J. R. G. Isbrucker,

Tio ĉi estas la raporto, kiun inĝ. Isbrucker faris en publika kunveno de la Akademio dum la 43-a unversala kongreso de Esperanto en Majenco en 1958. En sia raporto la prezidanto de la akademio metas la problemon pri la principoj de la vortfarado en Esperanto, memorigante la ĝisnunan disvolviĝon de la demando. Li emfazas speciale la teoriojn de Rjone d'Sosjur (René de Saussure) kaj de Ĉefeĉ (pseŭdonimo de Hoveler). Elmetinte, la starpunktojn de tiuj ĉi du eminentaj teoriuloj de la problemo, la aŭtoro mencias ankaŭ la nomojn de kelkaj verkin-toj de artikoloj kaj broŝuroj pri la sama temo, sed neklarigeble pro kio li ne diras eĉ unu vorton pri la starpunkto de P. Nylen kaj precipe pri la detala prilaboro de la temo fare de Koloĉaj (K. Kalocsay). Inĝ. Isbrucker (Isbrucker) kritike traktas la teoriojn, prezentitajn en la verkoj de R. d'Sosjur kaj de Ĉefeĉ; li akceptas la proponitan de R. d'Sosjur solvon pri la gramatika karaktero de la vortelementoj de Esperanto (kio estas ankaŭ la tezo de Koloĉaj). Li plue elmetas la sistemon de analizo kaj de sintezo (kunmetado) de vortoj kaj klarigas la principon de rapideco kaj de elasteco de la vortsignifoj kaj ankaŭ la principon de neceso kaj sufiĉo ĉe la formado de vortoj.

La principo pri neceso kaj sufiĉo, oficialigita de la akademio, estas sufiĉe konata al la esperantistaro. Malpli populara estas la principo pri la rigideco kaj elasteco de la signifo de la vortoj, proponita de R. d'Sosjur, kaj tial ni donas al la interesemaj legantoj la sekvan eltirajon el la verko de inĝ. Isbrucker:

«Nomante la elementojn (radikojn, afiksojn kaj finaĵojn) vortatomojn, oni povas nomi kunmetitan vorton vortmolekulo. Se vorto konsistas el nur unu atomo, oni nomas ĝin simpla vorto.

«Analizante vortmolekulon oni devas atendi, ke la senco de vorto ne estas ĉiam nevariebla. Ofte okazas, ke vorto, metita en ian tekston, havas iomete alian signifon ol kiam ĝi estas konsiderata tute memstare. Se ekzemple mi nomas la vorton 58, tiu vorto havas precizan kaj unuecan signifon. Sed se, komencante leteron, mi skribas la daton: la 7-an de aŭgusto 58, tiu sama vorto 58 ne plu signifas 58, sed 1958. El tio sekvas, ke unue ĉiu vorto havas precizan kaj nevarieb-

lan sencon, kiun ni nomas, laŭ d'Sosjur, la **senco rigida** kaj kiun la vorto havas sen kunteksto. Sed plue ĉiu vorto havas unu aŭ pli da sencoj, kiuj dependas ne nur de la rigida senco, sed ankaŭ de la kunteksto. Tiujn sencojn ni nomas la **sencoj elastaj**.

«D'Sosjur formulas tion ĉi en la du sekvantaj principoj:

1. **Principo de rigideco (aŭ unusenceco):** ĉiu vorto posedas unu sencon **rigidan**, nome tiun, kiu plej nature rezultas de ĝia tuta enhavo kaj nur de tiu enhavo, t. e. de la enhavo de ĝiaj diversaj partoj.

2. **Principo de elasteco:** krom tiu rigida senco ĉiu vorto povas akiri diversajn pli malpli **elastajn** sencojn, kiuj rezultas ne nur de la enhavo de la vorto, sed ankaŭ de la akompananta kuntekso.

«Ke vere la elastaj sencoj de la vortoj ekzistas, tion pruvas la tuta Esperanta literaturo, kie ili estas ĉie troveblaj».

La principo de rigideco kaj elasteco de la senco de vorto kaj la principo de neceso kaj sufiĉo ĉe vortformado estas ligitaj inter si kaj sur ili la aŭtoro bazas la donatajn analizojn kaj sintezojn por ilustrati la aplikon de tiuj ĉi principoj.

Sed en la raporto ni trovas nenian mencion, nek eĉ aludon pri la tezo de J. A. Gill, laŭ kiu la radikoj de Esperanto havas plurajn gramatikajn karakterojn.

Meritas montron speciale la formulo, per kiu R. Rosetti provas unuigi kaj pacigi la ĝisnunajn tezojn:

1. La esperantaj radikoj latente posedas plurajn gramatikajn karakterojn laŭ la asocioj de la radikideo.

2. Ĉe la pliparto de la radikoj unu gramatika karaktero estas ĉefa kaj fariĝas elirpunkto por la ceteraj.

3. Kelkaj radikoj estas pli malpli neŭtralaj: neniuj gramatika karaktero ĉefas. Ilin la vortaristoj arbitre asignas al unu aŭ alia kategorio.

Kiel konkludo al sia raporto inĝ. Isbrucker proponas, ke la akademio daŭrigu la studon de la problemo pri la vortfarado, konsiderante la ĝisnunajn proponojn kaj prenu difinitivan decidon. Ni ankaŭ esprimas deziron, ke tiu problemo jam estu oficiale solvita de nia supera lingva instituto.

A D A

DEZIRAS KORESPONDI

FINLANDO

S-ro Lauri Tuominen, Metsälä, Pudasjärvi (Syöte) — kun ĉl E kaj angle.

GERMANIO

Ernst Dietze, Choren Nr. 36, üb./Döbeln 2 — kun ĉl pri ĉt.

Adalbert Masuhr, Hainholz 45, (24 b) Elmshorn, DDR — kun Greklando, Kamboĝo, Rumanio, Bulgario, Ĉinio kaj Koreo; PI, E-gaz., E-gvidlibroj.

Karl-Ernst Ross (20-jara), H. Heine Str. 5, Welper a. d. Ruhr, kun ĉl, IK.

HUNGARIO

Kolomano Horvath (radio-raportisto, 26-jara). Pf: 542, Miskolc 10, kun ĉl.

Ferencné Kiss (instruistino), Nagyatád Gimnázium, Belpátfalva — kun ĉl.

Varga Valeria (lernantino, 17-jara) Jászdozsa, Dozsa György u. 16, kun ĉl en E, germane kaj hungare pri filmo, muziko, sporto.

József Szabó (kursgvidanto de E), Mav. Hidepítők, Belpátfalva, kun ĉl.

Eszter Toth (lernantino, 17-jara), Nyil u. 8, sz. Jászkeser — kun ĉl en E, germane kaj hungare pri filmo, muziko, sporto.

Maria Balogh (35-jara), Kut 5, Szolnok — kun ĉl, IK.

Peter Kerenyi, Kossuth 29, Budapest IV, — kun ĉl, PI, PM, paperaj buŝtuko.

JUGOSLAVIO

Feher Janez (teknikisto, 23-jara), Dolgas 97, Lendava — kun ĉl. pri ĉt.

Vlastimir Jovanovic (18-jara), lernanto — SPŠ (IV godina), Bukovo-Negotin — en E, france, germane, itale, angle kaj rumane.

POLLANDO

Gekursanoj atendas kontribuojn por letervespero. Adreso: Grupo de esperantistoj ĉe Kooperativa klubo, Plac 15, Grudnia 28, Jelenia Gora.

F-ino Eva Tatar (lernantino), str. Swietego Stanisława 8, m. 13, Krakow — kun ĉl, pri ĉt.

F-ino Barbara Poli (studentino), str. Fałala 14, m. 33, Krakow — kun ĉl.

F-ino Janina Pokryvka (studentino) str. Kraszewskiego 4, m. 6, Krakow — kun ĉl.

PORTUGALIO

Jose Pinto Ribeiro, Trav. do Sol 7, Evora — interŝ. kompletajn seriojn neuzitajn k. a. PM, laŭ interkonsento.

USSR

Midite Ruja (oficistino, 25-jara), str. Kr. Valdemara 19-6, Liepaja, Latvio — kun ĉl, pri ĉt, IK.

Marit Jakobson, str. Suur-Sepa 11-a—5, Pärnu, Estonio — kun ĉl.

Vladimir Lucenko (studento, 23-jara), ul. Jilanskaja 81, kv. 2, Kĭev 32.

Viktor Bobin (studento, 19-jara), Polupanova 21, kv. 39, Kĭev 34 — kun ĉl, pri sporto, filmoj k. a. Interŝ. PI, PM.

ĈEĤOSLOVAKIO

Antonin Strěbla, Ĉeska Lipa, trida Vítězství 566 — 46 jara

Luboš Dejl, Ĉeska Lipa, h. Vibody 1669 — 36 jara

ESPERANTISTA FREMDUL- TRAFIKA SERVO:

1. Rezervas hotelĉambrojn por individuoj kaj karavanoj. (ankaŭ modesta tranokto).
2. Prizorgas gvidadon kaj informojn.
3. Sendas turistajn prospektojn.
4. Serĉas kunlaborantojn kontribuitajn.

Direkcio: R. LOECKX, Konijnenperken, 109, Bruselo 17 (Belgio) FD. UEA.

Tel. Bruselo 72.32.22 (1 Rpk. m. p. por korespondajo)



Avo Zamenhof, Esperanto vere helpas nin

0.25 lv.

Liveras
B E A

Al societoj
rabato —
0.20 lv.

Tuj mendu
tiun belan
propagandan
karton
tre konvenan
por
korespondado

**BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO**



MEMBROKARTO

Tuj mendu la membrokar-
ton sendante po

1 lv.

por ĉiu karto kaj nomaron
de la membroj ricevontaj
ĝin notante la komencan
jaron de lia (ŝia)
esperantisteco